

# Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2010:4 (jul-aŭg)

# American **Esperantist**

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2010:4 (Jul-Aug)



Steve BREWER

## Ankaŭ ĉi-numere:

- Feeling *In the Mood?*
- Raporto de la IJF
- Teksto de la LK-parolado de Jim RYAN
- La "verda banko"
- Recenzo: *La Korvo*
- Krucvortenigmo
- kaj pli...

**Kongresa sukceso: raportoj de la 58-a Landa Kongreso de Esperanto-USA en Vaŝingtono, DK (vidu p. 6)**

# Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 49, No 4 — 2010:4 (jul-aŭg)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto (American Esperantist) is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your email/postal address, and a closeup photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint content from this publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*



*Usona Esperantisto* estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retroŝtonon, kaj aldonu viajn nomon, (ret)poŝtadreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajna republikigita materialo. Opinioj esprimataj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.



Centra Oficejo • *Central Office*

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • *Direktoro*, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • *President*: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • *Vice President*: Tim WESTOVER

Sekretario • *Secretary*: Steve BREWER

Kasisto • *Treasurer*: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • *Other board members*: George BAKER, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, ROS Haruo, TOR KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING, Julie WINBERG

## Podkasto kaj interreta radio

Ekzistas pluraj radioelsendoj en Esperanto kiuj nun haveblas interrete; jen nur kelkaj. Atendas vin vera trezoro de interesaj programoj!

- ★ *Radio 3ZZZ* (Aŭstralio)  
<http://melburno.org.au/3ZZZradio>
- ★ *Radio Vatikana* (Vatikanurbo)  
<http://radio-vatikana-esperanto.org>
- ★ *Radio Aktiva* (Urugvajo)  
<http://radioaktiva.esperanto.org.uy>
- ★ *La NASKa Podkasto* (Usono)  
<http://esperanto.org/nask/podkasto>
- ★ *Ĉina Radio Internacia* (Ĉinujo)  
<http://esperanto.cri.cn>
- ★ *Radio Havano* (Kubo)  
<http://ameriko.org/eo/rhc>
- ★ *Parolu Mondo* (Brazilo)  
<http://parolumondo.com>
- ★ *Varsovia Vento* (Pollando)  
<http://viavento.republika.pl>
- ★ *Pola Radio* (Pollando)  
<http://polskieradio.pl/eo>
- ★ *Radio Verda* (Kanado)  
<http://radioverda.com>
- ★ *Radio Esperanto* (Rusujo)  
<http://la-ondo.rpod.ru>



## Verku por Usona Esperantisto!

Leteroj prefere estu ne pli ol 400 vortojn longaj; eventraportoj, 250. Ni laŭbezone koncizigos. Pli longajn kontribuojn (artikolojn, recenzojn, ktp) ni bonvenigas, sed bonvolu proponi vian ideon al la redakcio antaŭ ol sendi verkon netan.

*Letters should be no longer than 400 words each; event reports, 250. We'll edit for length as needed. Longer contributions (articles, reviews, etc.) are most welcome, but please send us your idea first before sending a finished text ready for publication.*



**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone & Fax: \_\_\_\_\_

E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (M/D/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_ Ham radio call: \_\_\_\_\_

In the member list, don't publish my:  address  phone  fax  email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

Friend of Esperanto ..... \$10.00  
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)

Youth (you must be under 27) ..... \$20.00

Limited Income ..... \$20.00

Individual ..... \$40.00

Family ..... \$60.00

Sustaining ..... \$80.00

Life (birthdate required) ..... \$800.00

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

Card verification #: \_\_\_\_\_ (three digits on back of card, or on front for AmEx)

## Regional events

These are just a few of the upcoming events in July and August. For a more comprehensive list, see <<http://www.eventoj.hu/2010.htm>>.

### July 17 – 24 (Havana, Cuba)

#### **Universala Kongreso de Esperanto**

The 95th International Congress in Havana. See <<http://uea.org>> or contact <[uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)>

### July 24 – 31 (Los Cocos, Cuba)

#### **Internacia Junulara Kongreso**

The 66th International Youth Congress takes place this year in Santa Cruz del Norte, a scenic locale close to Havana. See <<http://tejo.org/ijk/2010>>.



### July 25 – 31 (Minsk, Belarus)

#### **Teatro-staĝo laŭ la rusa metodo**

Two weeks of intensive study in improvisational theatre, rhythm and dance, speech training, and more. Organized by the acting company *Demain le Printemps* and led by instructors from the Minsk Academy of Arts. For more info, see <<http://morgaulaprintempo.org>>

### August 7 – 14 (Baugé, France)

#### **Semajno de muziko ĉe Greziljono**

A week of music and language courses at the *Château de Grésillon*, a castle in northwest France. Greziljono is home to a wide variety of Esperanto events throughout the year; the summer offerings alone are too numerous to list here! For a complete schedule, see <<http://gresillon.org>>.



### August 8 – 11 (Seoul, South Korea)

#### **Internacia Renkontiĝo de Meditado**

Meditation practice, group excursions to local sites, and a chance to experience Korean culture. See <<http://uonbulismo.net>>.

### August 23 – 29 (Marburg, Germany)

#### **Kafoklaĉa Internacia Somera Renkontiĝo**

KISO offers everything from bicycle trips to music, as well as workgroups on translation, juggling and the didgeridoo! For more info, see <<http://home.foni.net/~gunter/KISO/>>.

## Local groups

Local groups provide opportunities for new and experienced speakers alike. Most meet at least monthly; some, weekly. Below are contact addresses for some of the larger groups that meet regularly; for more complete info, see our website.

### California

**Sacramento:** <http://esperanto.org/us/esos>

**San Diego:** <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

**San Francisco:** <http://esperanto.org/us/SFERO>

**Santa Barbara:** [dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)

**L.A.:** <http://fizzyllogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

**Colorado** (Longmont) <http://ek-ek.org>

**Connecticut** (Wallingford) <http://esne.net>

**District of Columbia** <http://esperantodc.org>

**Georgia** (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

**Hawaii** (Honolulu)

<http://esperanto.org/us/Honolulu>

**Idaho** (Boise) <http://terpomuloj.org>

**Illinois**

**Champaign-Urbana:** <http://ekoci.org>

**Chicago:** <http://esperanto-chicago.org>

**Maine** (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

**Massachusetts** (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

**Missouri** (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

**New Jersey** (Princeton)

<http://esperanto-nj.tripod.com>

**New York**

**New York:** <http://esperanto-nyc.org>

**Rochester:** <http://esperanto.lodestone.org>

**Ohio** (Cincinnati) <http://ligileto.freeshell.org>

**Texas**

**Austin:** <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

**Dallas:** <http://esperanto-tx.org>

**Virginia** (Hampton Roads) <http://bonege.com>

**Washington** (Seattle) <http://seattleesperanto.org>

**Wisconsin** (Madison) <http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

## Encounter with Garrison Keillor

Reported by Ellen Eddy

WASHINGTON, DC — While taking a break after his appearances at Wolf Trap and wandering through the Smithsonian American Art Museum in Washington, Garrison Keillor was approached by two visitors who were in DC celebrating the 100th anniversary of the visit of the creator of the international auxiliary language Esperanto: Dr. L. L. Zamenhof was the distinguished guest at the World Esperanto Congress in 1910.

In memory of that event, Esperanto-USA chose Bethesda for this year's annual meeting. Mary Hammersmith and Ellen Eddy were pleasantly surprised that Keillor knew about Esperanto, but he didn't believe that any living person spoke it. They suggested that he mention on the next episode of *Prairie Home Companion* that he'd actually heard the language spoken and can now attest to the fact that it's still alive. (Apparently there are no Esperanto speakers in Lake



Wobegon). Washington is full of pleasant surprises and famous people.

## Holokaŭsta kunmemoraĵo

Raportas Fred MEYER III

RICHARDSON, TEKSASO — Sabaton la 10-an de Aprilo 2010, kelkaj membroj de la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso partoprenis en holokaŭsta kunmemoraĵo ĉe Sinagogo Beth Torah en Richardson, Teksaso. Oni kunmemorigis, per legado de iliaj nomoj, homojn kiuj mortis dum la Holokaŭsto en Eŭropo dum la Dua Mondmilito.

La ceremonio komenciĝis kun priskribo de la evento fare de ano de la Vira Komitato. Post tio sekvis kortuŝa parolado de Rabeno Adam RASKIN. Trie sekvis diskuto de Earl (Jarlo) BILLS pri la mortigo de esperantistoj, multaj el kiuj estis judoj, dum la Holokaŭsto. Post tio la ĉeestantaj esperantistoj legis la nomojn de kelkaj mortigitaj esperantistoj.

Poste esperantistoj partoprenis en la legado de la nomoj de holokaŭstaj mortigitoj ĉe la sinogogo. Dum la tuta 24-hora periodo, kelkaj legantoj legis nomojn en la sanktejo, dum aliaj legantoj interparolis, rigardis kolekton de originalaj fotoj de la Holokaŭsto, aŭ dormis.

## Poŝtkesto

### *Growing up with Youtube*

In "Growing up with Esperanto" (2010:2) Christopher Zervic forgot to mention his marvelous dialog with son Cooper, then 21 months. It's an endearing introduction to Esperanto and bilingualism generally. I imagine young Ludvic Z. charming diverse neighbors in Bialystok with such unselfconscious engagement in what is, for older folks, "foreign" language. See it at YouTube: search for "Bebo parolas Esperanton".

—E. James Lieberman, <ejl@gwu.edu>

## Sukcesa kongreso

Raportas Filipino DORCAS, prezidanto

Esperanto-USA kongresis en Vaŝingtono de la 28-a ĝis 31-a de majo. Entute 107 ĉeestis. La estraro kunsidis vendredon, kaj decidis prilabori tri-monatan planon. Unu tasko estas reverki la libron *Manlibro por Estraranoj kaj Komisionoj*. Alia estas restarigi la Komitaton por Publikigado (Informado), okaze de la sukcesa, tutlanda, publika raporto en la angla de NPR (Nacia Publika Radio) pri Esperanto kaj la kongreso.

La rezultoj de la balotado por estraranoj estas, ke ni bonvenigas la kandidatojn Ĝan STARLING kaj George BAKER al la estraro. Julie SPICKLER servas denove kiel estrarano, kaj Steve BREWER estas nia sekretario. Ili kvar servos deĵore ĝis 2013. Christopher ZERVIC jam estis nomumita kiel kasisto kaj servos ĝis 2012. Dankon al estraranoj Ĵenja AMIS kaj Anjo HARLOW, kies deĵoro finiĝis dum ĉi tiu kongreso.

Okazis du aferkunsidoj de la ĝenerala membraro de Esperanto-USA dum la kongreso. Ni unuanime honoris invititan gaston Peter BENSON pro lia sindediĉa laboro por la fama vortaro *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*. Ni starigis komitaton, kiun Benson mem estras, por reverki kaj reeldoni tiun bonegan libron, kiu aperos surpapere kaj interrete.

Ni unuanime aprobis la buĝeton por 2011, la jarraporton por 2010, kaj aranĝon por lui oficejon en Novjorko por la reprezentanto al la Unuiĝintaj Nacioj de UEA. UEA repagos nin por la lupago laŭ bezono. Dankon al Neil BLONSTEIN por fari tiun laboron ĉe la U.N. kaj zorgi multe pri niaj rilatoj kun reprezentantoj, delegitoj, kaj ambasadoroj de multaj landoj.

Ni unuanime aprobis dankojn al la hotelo de la kongresejo, *Hyatt Regency Bethesda*, kaj al la Loka Kongresa Komitato (LKK), Jed MELTZER (estro de la komitato), Jim RYAN (prezidanto de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono), Ralph DUMAIN, Daniela POWER, Charles POWER, David SLETTEN, Harold GOODMAN, David DOUGHERTY, Erinja PIATESKI, James LIEBERMAN kaj aliaj.

Faris aliajn kunsidojn Arika OKRENT (“Esperanto kaj inventitaj lingvoj”), Humphrey TONKIN (“Esperanto en la nuna mondo” kaj la “Esperantic Studies Foundation”), Darsi ROSS (“Organizado en universitatoj”), Esther SCHOR (“Poezia rondo”), Ralph DUMAIN (“Esperanto, Vaŝingtono, kaj la mondo de 1910”), Lusi HARMON (“Kial ni ne rajtas iri al la UK”) kaj aliaj prelegantoj.

Okazis interkona vespero, bankedo kun parolado de Jim RYAN, distra vespero, aŭkcio, akcepto de UEA-delegitoj, AAIE-kunsido, kaj tre interesaj ekskursoj al gravaj lokoj en Vaŝingtono (ekz. la Holokaŭsta Muzeo, kaj monumentoj al Abraham LINCOLN, George WASHINGTON, kaj Thomas JEFFERSON). Kompreneble, ni vizitis la lokon kie Dr. L. L. ZAMENHOF prelegis tre proksime al la Blanka Domo antaŭ cent jaroj. Aparte memoriginda estis la ekskurso al la Parlamenta Biblioteko, kiun partoprenis 53 kongresanoj. Tiuj ne nur ekskursis tra la biblioteko, sed ankaŭ ĝuis akcepton por ili, gastigate de Lee DOUGLAS, esperantisto kiu laboras tie. Douglas parolis pri la biblioteko, ĝia Esperanta kolekto kaj diversaj serĉmetodoj por utiligi ĝin. Li estis sterninta por ni plurajn erojn de la plurmilnombra kolekto de esperantaĵoj.

Ni rimarkis kun miro la grandan kvanton da junuloj ĉe la kongreso. Impone



Filipo (dekstre) kun Peter BENSON.

granda grupo karavanis ĉi tien el la Universitato de Ilinojso. La plej juna partoprenanto estis la kvin-jaraĝa knabo Daniel BROWN de norda Teksaso.

Dankon al la LKK pro bonega kongreso! La venonta kongreso okazos en la regiono de San Francisco (per SFERO, la San-Franciska Esperanta Regiona Organizo) de la 2-a ĝis 5-a de junio, 2011, ĉe la Universitato de Kalifornio, Berkeley.

Al Kalifornio en 2011!

## Post-kongresaj pensoj

Raportas Jed MELTZER

En la lastaj jaroj, mia esperantista vivo multe riĉiĝis pro du neforgeseblaj kongresoj: la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Montrealo (2008), kiun mi ĉestis kiel kutima partoprenanto, kaj la Landa Kongreso en Vaŝingtono, por kiu mi servis en la Loka Kongresa Komitato. La unua sperto kondukis rekte al la dua, kaj survoje mi lernis ne nur kiel okazigi kongreson, sed pli grave, kial. Homoj venas al kongresoj por diversaj celoj, sed mi konvinkiĝis ke la ĉefa beno de kon-



greso por la Esperanta movado temas pri speciala grupo de partoprenantoj, kies estontajn opiniojn kaj agemon pri Esperanto ni povas profunde influ. Ili estas nek la plej spertaj nek la plej novaj al la movado. La plej spertaj daŭrigos sian sindediĉon sen nia helpo, kaj la plej novaj dependas je siaj lokaj kluboj por el-lerni la lingvon kaj subteni intereson. Sed inter tiuj du ekstremoj, troviĝas tiuj kiuj jam sufiĉe interesiĝis por ĉeesti kongreson, sed eble ĝi estas la unua fojo, aŭ (en mia kazo en 2008) la unua post multjara malapero de la movado. Por tiuj, bona kongreso povas kuraĝigi ilin al nova florado de intereso kaj agemo, kaj enua sperto povas estingi apenaŭ vekigintan intereson.

Ĉi-jare, ni bonŝance havis grandan grupon de tiuj homoj. Dank' al la senlaca laboro de junaj organizantoj en universitatoj, kaj la subvencio de la Schulze-fonduso (donacu!), ĉeestis la kongreson pli ol 15 studentoj. Ili ĉiuj jam lernis sufiĉe de la lingvo por signifoplene partopreni la kongreson, sed por multaj estis la unua fojo paroli la lingvon kun iu ajn ekster la loka klubo. Do la universitataj organizantoj plenumis duonon de la tasko, kuraĝiginte ilin veni al la kongreso, sed restis je ni, la LKK, la devo kapti la okazon. La kongreso en 2008 sukcese vekis mian internan esperantiston, kaj simile mi kredas, ke ni en 2010 sukcesis certigi ke por multaj el tiuj junuloj, la unua kongreso ne estos la fina. Mi "amikiĝis" je Vizaĝlibro kun multaj studentoj, kaj en la tagoj post la kongreso mi legis komentojn pri kiom ili ĝuis la kongreson sed volas plibonigi sian regon de la lingvo, ktp.

Kutime por mi, ju pli bona estas kongreso, des pli longe mi sentas la mankon de dormo poste. Ĉi-jare, mi bezonis preskaŭ semajnon por senti min normala. Fakte mi ne povas kulpigi la junulojn pro diboĉemo; estis ni, la “post-junuloj” en la 30-eca jaraĝo, kiuj sentis la devon distri kaj dancigi la verajn junulojn. Mi tre ĝojis vidi ke, ekster la oficialaj horoj de la kongreso, okazis senĉesa babilado kaj ludado inter la partoprenantoj. Jen la vera kerno de la kongresa etoso. Estas malfacile plani tion en la programo. Tio, kion ni povas fari, estas certigi ke ĉiu kongreso havu tiom bonan etoson, ke ĉiuj homoj volos reveni la sekvantajn fojn, por daŭrigi la energion de unu kongreso al alia.

*Noto: partoj de la Distra Vespero spektaklas en YouTube; registris ilin uzanto “hammerhorn.” Serĉu por “landa kongreso”.*

## La jarkunsido de AAIE

Raportas Ron GLOSSOP

La jarkunsido de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto okazis je la 5-a horo ptm je la 30-a de majo en Vaŝingtono kadre de la Landa Kongreso de Esperanto-USA.



Prezidanto Ron GLOSSOP prezidis kaj Koresponda Sekretariino Sally LAWTON protokolis. Vic-Prezidanto Gary GRADY kaj Eduka Sekretariino Ŝeri WELLS partoprenis, sed Kasisto Mary NAPOLITAN kaj Redaktoro Doroteo HOLLAND ne povis veni. Proksimume dudek membroj ĉeestis, inkluzive de tri novaj membroj: Gary ANDERSON (Seatlo), Neil BLONSTEIN (Novjork-urbo), kaj Chuck MAYS (Raleigh, NC).

Ni aprobis la protokolon pri la 2009-AAIE-jarkunsido en Sankta-Luiso kaj la raportojn de ĉiuj postenuloj kiuj aperis en la printempa *Bulteno*, inkluzive la raporton de la Kasisto ke la nuntempa saldo de AAIE estas \$3,658.99; la ĉefaj elspezoj estis por niaj kotizoj al la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj por la *AAIE-Bulteno*. Ni voĉdonis unuanime por deklaracio ke Doroteo HOLLAND estu nomita “Honora Membro de AAIE” kun la kompreno ke ŝi ne plu devos pagi membrecon por AAIE aŭ ILEI.

Ni voĉdonis unuanime ke Ŝeri WELLS daŭrigu kiel nia Eduka Sekretario kaj ke Chuck MAYS iĝu nia nova Kasisto. La ofic-periodo por ambaŭ estos 2 jaroj.

Ron indikas ke nova problemo ekzistas por AAIE ĉar ILEI nun decidis ke ĉe ĉiu landa asocio la ofic-periodo de la Prezidanto (kiu ankaŭ devas esti la land-Sekciestro) devus esti tri jaroj, sed la statuto de AAIE enhavas malsaman aranĝon, nome, ofic-periodon de du jaroj. Ron ankaŭ indikis ke dum la pasintaj du jaroj li ne povis trovi homojn kiuj volus servi kiel Kandidatiga Komitato. Tial li proponis novan aranĝon. Post iom da diskuto, estis konsento ke la nova vortumado de la AAIE-statuto devus esti: “Postenuloj estas prezidanto, vicprezidanto, koresponda sekretario, eduka sekretario, kasisto, kaj redaktoro. Ĉiujn (krom la redaktoro) la membraro elektos inter la membroj dum jara kunveno por trijara deĵor-periodo kiu komenciĝos je la fino de la jarkunveno de la jaro 2012 kaj je ĉiu tria jaro post tio.” Tiun proponon nia AAIE-membraro devos aprobi per balotilo ĉar malpli da duono da la AAIE-membroj partoprenis la jarkunsidon en



Vaŝingtono kaj la statuto diras: Por amendi [la statuton], necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentas minimume duonon de la membraro. AAIE havas 53 membrojn.

Ŝeri Wells gvidis diskuton pri la bezono partopreni la konferencojn por instruistoj de fremdaj lingvoj, por ke ili konsciis ke Esperanto vivas.

La posta AAIE-jarkunsido okazos dum la kongreso de Esperanto-USA en Berkeley, Kalifornio de la 2-a ĝis la 5-a de junio 2011.

## **Library of Congress field trip**

*Reported by Ralph Dumain*

On the afternoon of Saturday May 30 a contingent of Esperantists made a pilgrimage to the Library of Congress, one of our greatest national treasures, where we were greeted by Lee Douglas, a veteran Esperantist and librarian stationed in the Local History & Genealogy Dept.

Also awaiting our arrival was a display of books from the library's rich collection (on site and from the repository in Ft. Meade) and from Mr. Douglas's personal collection, ranging from old and rare to recently published items. I made a note of a few items of interest: *Class Leader's Course by Correspondence* (American School of Esperanto, Washington D.C., 1911); *Practical Esperanto: Complete Method for Learning the International Language "Esperanto": Home Course* (William Sol Benson, 1925-1932); *Proleta Kurso de Esperanto, vol. 5* (Tokyo, 1932); *La Lasta Usonano* by J. A. Mitchell (various editions); *Vivprotokoloj: Ĉiutagaj Vi-*



*voj, Rakontitaj de Esperantistoj* compiled by Ulrich Becker & Zdravka Metz (2nd ed., 2009). In turn, we presented items for donation to the library's collection.

Mr. Douglas treated us to an overview of how to fully use the library's resources, which included information new even to me as a veteran researcher. There are various tricks to using the online catalog available to everyone, especially in light of the newer practice of "minimal level cataloging."

In addition to researching the usual published formats, one must do some digging to find Esperanto-related material in various archives. For example, the library has on microfiche the German secret police reports covering the period 1920-1933, in which the Esperanto movement was heavily surveilled by government spies.

Finally, the acquisitions policies of the library were reviewed. The Library of Congress accepts everything, throws nothing away, but will probably never catalog a substantial percentage of material entered into storage. Esperanto material is of the lowest priority for cataloging, and of a very low priority for regular acquisitions. You can of course write to the Library of Congress yourself urging your priorities, but you are unlikely to have much impact unless you or someone you know has pull.

I trust that others moved on to take in other departments of the Library of Congress or other tourist attractions. I remained behind to pursue my research passion for a bit. Thanks, Mr. Douglas and the Library of Congress staff, for your service to our group as well as to the national memory.

## fotoj de la kongreso

Supre: matenmanĝo ĉe *Caribou Coffee* – “oficiala kafejo” de la kongreso; Julinjo, la bela “mistera gasto”, debutas kaj dancas dum la *Distra Vespero*. (Fotoj de Chris HORN). Meze: Benĉjo STEVENS kaj Jessica SEMINARA muzikumas ĉarme; Jed MELTZER kaj lia grupo *By & By* regalas per “bluherba” muziko en Esperanto. (Fotoj de Neil BLONSTEIN). Malsupre: Andy ROSENBAUM instruas fonetikon; Esperantistoj amase invadas metroon. (Fotoj de Lathan MEJIAS).





*Jen la impona bankeda parolado, kiun prezentis al ni James RYAN, Prezidanto de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono. Ni aperigas ĝin ĉi tie aparte por tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la kongreson.*  
– Red.

Antaŭ cent jaroj, unu el la plej mirindaj homoj en la mondo venis al unu el la plej mirindaj urboj en la mondo. Ludoviko ZAMENHOF, kiu brave kaj genie kreis la lingvon kaj movadon de Esperanto, venis por ĉeesti la Universalan Kongreson de Esperanto ĉi tie en Vaŝingtono, ĉefurbo de lando kiu estis simbolo de libereco tiam nove elpaŝinta sur la mondan scenejon.

La alveno de Zamenhof en Vaŝingtono markis la kuniĝon de du defiantoj de skeptikismo de multaj spertuloj.

Ĉiuj ekspertoj bone sciis en la malfrua 18-a jarcento ke oni ne povas krei funkciantan demokratian respublikon en la moderna mondo, tute ne en eĉ tiam sufiĉe granda lando kiel Usono.

Kiel ni kreis nian *Novus Ordo Seclorum* – Nova Ordo de la Epokoj – ni ankaŭ kreis tute novan ĉefurbon por ĝi, sur la kotan flankon de la Potomako, inter nordo kaj sudo – politika kaj geografia kompromiso.

Plue, niaj fondintoj decidis ke la nova ĉefurbo ne apartenu al iu ŝtato, sed estu en sia propra, aparta distrikto. Tiel ĝi apartenus al neniŭ, do al ĉiu.

Oni planis ĝin el nenio, sed laŭ logikaj kaj validaj principoj – artefarita urbo, oni povus diri.

Same, post cent jaroj, ĉiuj ekspertoj bone sciis ke unu homo en Bjalistoko ne povus memsole krei lingvon, ankaŭ el solidaj principoj kaj scioj, kun sukceso.

Unu el tiuj principoj estis ke la nova lingvo ne estu parto de iu sola lando, kulturo aŭ politikaro. Tiel ĝi apartenus al neniŭ, do al ĉiu.

Tutcerte la ekspertoj neus la eblecon ke tiu “artefarita lingvo” estu la centro de publika atento en Vaŝingtono post nur 23 jaroj, kaj, jarcenton poste, ke ĝi estu uzata kaj uzata de milionoj.

Ĉi tie, antaŭ cent jaroj, unu defianto salutis alian per parolado kiu fariĝis ne nur klasikaĵo de Esperanto, sed antaŭ ĉio trezoro al ni usonaj esperantistoj. Dum ni estis studentaj ĉi tiun juvelan lingvon, multaj ni raviĝis legi kaj lerni ĉi tiujn vortojn:

*Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas! Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi, vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniŭ monopoligitan aeron.*

*Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samideanoj kaj samidealanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri ia nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj.*

*Peco de tiu miksidevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi reale kaj vivante. Rigardu nin, aŭskultu nin, kaj konvinkiĝu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas diversgentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni komprenas nin kiel samgentanoj, havante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian.*

*Ni esperas, ke dank’ al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similiĝos al ni kaj fariĝos unu granda homa gento, konsistanta*

*el diversaj familioj, interne apart-lingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj.*

Alivorte: *E Pluribus Unum*. Aŭ, kiel ni nun diras en la Latina Lingvo de Demokratio, *El Pluraj, Unu*.

Tio estas celo pri kiu konsentas preskaŭ ĉiuj, sed kiel efektiviĝi ĝin estas disputata. Ĝis kiu nivelo homoj de diversaj fonoj devus enmergiĝi en la usonan kulturon, sen perdi sian identecon?

Tiu demando estas tiel aktuala kaj urĝa nun kiel antaŭ cent jaroj. Eble eĉ pli. En la tuta mondo, jes, sed speciale tiu demando frapas en ĉi tiu nia lando, la plej enmigrata lando kun la plej granda diverseco de gentoj kaj kulturoj.

La kora principo kiu gvidu la respondojn al tiu demando estu: Honori kaj reteni la trezorojn de la antaŭaj kulturoj kiujn oni posedas, kunhavigi ilin al aliaj, kaj samtempe honori la trezorojn de aliaj – sed ankaŭ esti parto de, kaj kontribui al, la tuto.

La samajn principojn oni uzu en la individua vivo – respekti sin mem, sed ankaŭ malsamajn homojn.

Oni ja povas kaj devas honori la *Pluribus* kaj la *Unum* samtempe.

Kiom longe ni homoj bezonos por lerni tiel simplan, sed komplikan, lecionon?

Ni konas lingvon kiu estas unu ilo kiu povas helpi la homaron lerni tion. De sia komenco, Esperanto estis enkorpiĝo de la spirito de *E Pluribus Unum*. Ĝi estas miksaĵo de pluraj lingvoj, farante unu – la unu lingvon plej bonan por antaŭenigi mondan komprenadon kaj pacon. Ĝi estas simbolo kaj rimedo de la esperata fenomeno ke el pluraj rasoj, gentoj, landoj kaj kredoj, la pluraj faras unu grandan rondon familian.

Zamenhof diris ĉi tie en 1910, ne malmode, sed racie, pri tiu genia

lingvo: “Logika esploro de la afero montras al ni, ke lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto.”

Tiurilate la mondo eble plej frape ŝanĝiĝis de 1910. Tiam la angla estis nur kreskanta kiel estonta mondlingvo kiel Usono estis kreskanta kiel mondpotenco. Nun la angla estas atinginta potencon antaŭviditan de malmultaj antaŭ unu-du jarcentoj. Ni ĉiuj konscias kiom vaste parolata kaj uzata estas la angla.

Sed grava afero ne ŝanĝiĝis de 1910: Esperanto estis kaj estas la plej bona internacia lingvo – tiam kaj nun! Ni ĉiuj scias kial – ĝi estas la plej facila lingvo por lerni, la plej logika, plej bela, plej utila, plej ĝuinda lingvo kun la plej aminda kaj valora spirito.

Ju pli ni montros al homoj tiujn avantaĝojn de nia lingvo, kaj se tiuj homoj honeste taksos la kvalitojn de la angla kaj Esperanto – ne laŭ eraraj supozoj ke la angla jam atingis la rangon de efika, por-ĉiama mondlingvo aŭ ke Esperanto estas nur ideo de la pasinteco, sed laŭ la meritoj de la lingvoj kiel mondaj komunikiloj – des pli mi fidus ke preskaŭ ĉiuj elektos Esperanton.

Vaŝingtono estas urbo nomita por la Patro de Nia Lando, la unua heroo de Usono, kaj ĉi tie multaj aliaj herooj faris miraklojn: Ĉi tie Lincoln savis la Union kaj ebligis la neniigon de sklaveco en Ameriko. Ĉi tie Teddy ROOSEVELT montris ke la registaro povas, rajtas kaj devas agi mult-flanke por plibonigi la nacion.

Ĉi tie Franklin ROOSEVELT savis nian ekonomion de ĥaoso kaj demokration de faŝismo. Ĉi tie John F. KENNEDY, kies naskiĝtago estas hodiaŭ, spronis la landon al nove viglaj idealismo, patriotismo kaj agemo.

Ni scias ke Usono estas lando, kaj Vaŝingtono estas urbo, kie multaj maljustecoj tro longe daŭris. Eble plej doloriga

kaj ofenda estis la longedaŭra makulo en nia historio: la segregacio de la rasoj, kiu restis nekredible longe, kaj la subpremadado de afrik-usonanoj, kiu daŭris eĉ plu.

La fitraktado de la indianoj – la originaj amerikanoj – estas alia korrumpa ekzemplo.

Ĉi tie oni konstruis templon al heroo de homaj rajtoj, kun la vortoj enĉizitaj en la mamoro: “En ĉi tiu templo, kiel en la koroj de sia popolo, por kiu li savis la Union, la memoro de Abraham LINCOLN estas ensanktigitaj por ĉiam.” Kiu ne emociiĝus starante antaŭ tiu figuro kaj tiuj vortoj?

Sed en 1922, kiam oni dediĉis tiun templon, nigruloj ne rajtis spekti la eventon kun la blankuloj, sed nur aparte, en *apartheid*.

Sed ankaŭ estis ĉe tiu sama templo kie, en 1939, nigra kantistino Marian ANDERSON, helpite de Eleanor ROOSEVELT, regalis aŭdantojn per siaj kantoj de la spirito, spitante la bigotojn kiuj ne volis ke ŝi levu sian voĉon publike, vidate kaj aŭdate de ĉiuj en nia ĉefurbo kiel simbolo de egaleco.

Kaj ankaŭ estis ĉe tiu sama templo, en 1963, kie Martin Luther KING fajrigis la konscion kaj konsciencon de la mondo per siaj vortoj:

*Mi havas revon, ke iun tagon ĉi tiu nacio leviĝos kaj vivos laŭ la vera signifo de sia kredo: “Ni taksas ĉi tiujn verojn esti memevidentaj: ke ĉiuj homoj estas kreitaj egalaj.”*

*Mi havas revon ke miaj kvar infanoj vivos iun tagon en nacio kie ili estos juĝataj ne de la koloro de sia haŭto, sed de la enhavo de sia karaktero.*

*Mi havas revon ke iun tagon sur la ruĝaj montetoj de Georgio, la filoj de antaŭaj sklavoj kaj la filoj de antaŭaj sklavposedantoj povos sidiĝi kune ĉe la tablo de interfrateco.*

*Estos tago kiam ĉiuj infanoj de Dio povos kanti kun nova signifo, “Mia lando, estas pri vi, dolĉa lando de libereco, pri vi mi kantas. Lando kie miaj patroj mortis, lando de la fiero de la pilgrimoj, de ĉiu montoflanko, lasu liberecon sonori!”*

*Kiam ni faros tion – kiam ni lasos liberecon sonori de ĉiu ... ni proksimigos la tagon kiam ĉiuj la gefiloj de Dio, blankaj kaj nigraj, judaj kaj nejudaj, katolikaj kaj protestantaj, povos ligi la manojn kaj kanti, en la vortoj de tiu malnova negra spiritkanto, “Finfine liberaj, finfine liberaj, danke al Dio Ĉionpova, ni estas finfine liberaj!”*

Sonas eĉ pli bone en Esperanto, ĉu ne? Eble estas tiel ĉar Zamenhof jam estis parolinta tiel multajn jardekojn antaŭe. Kaj eble estas tiel ankaŭ ĉar Esperanto, la lingvo de paco, estas natura esprimilo por tiaj noblaj sentimentoj.

Tiu parolado, la murdo de Prezidanto Kennedy tiujare, kaj la senlaca laborado de progresivuloj, fine efektivigis la Leĝaron de Civilaj Rajtoj de 1964, leĝaro kiu forigis multajn maljustecojn kaj levis la vivojn de sennombraj homoj.

Ĝi ankaŭ kreis la registaran instancon kie mi laboras dumtage, kiam mi ne esperantumas: la Usonan Komisionon pri la Egaleco en Dungado, kiu gardas milionojn da homoj kontraŭ discriminacio ĉe laboro.

Vortoj gravas. Vortoj povas movi montojn. Ankaŭ niaj vortoj en nia amata lingvo povas movi montojn.

Jes, Vaŝingtono estas la urbo kie reakciuloj longe blokadis, kaj ankoraŭ blokas, bezonatajn reformojn.

Sed ĝi ankaŭ estas la urbo kie Barack Hussein OBAMA enĵuriĝis kiel Prezidanto de Usono – spektaklo kiun milionoj esperadis vidi en siaj vivdaŭroj, sed dubadis ke tio povus okazi. Kiel oni diris, Rosa PARKS sidis por ke Martin povu stariĝi por ke Barack povu kuri. Kiel

Prezidanto Obama mem diris, antaŭnelonge, lia patro ne estus rajtinta eniri restoracion en la najbarejo kie ties filo estos inaŭgurata kiel Prezidanto.

Kaj Vaŝingtono ankaŭ estas la urbo kie, finfinege, en ĉi tiu jaro 2010, post pli da jarcento da baraktado, la usona Parlamento aprobis leĝaron por ebligi ĉiun usonanon akiri asekuron por la sano.

Jen vera ekzemplo de neflankiĝanta strebado malgraŭ obstakloj kaj skeptikismo! Pasio plus pacienco estas la ŝlosiloj.

Klare, Vaŝingtono estas urbo de mirakloj! Iuj tiuj mirakloj estas kvietaj kaj longe disvolviĝantaj, kiel la kreskado de floro. Aliaj estas laŭtaj kaj dramaj. Kaj aliaj mirakloj estas de ambaŭ specoj. Ni esperantistoj plejparte devas atendi la kvietan, longedaŭran specon.

Kiel Zamenhof diris ĉi tie antaŭ cent jaroj:

*Ni povas sekve labori trankvile; ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafoje tre malfacila kaj sendanka; sur nia flanko estas ne sole la fajro de niaj sentoj, sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj leĝoj de la logiko kaj prudento. Pacience ni semu kaj semu, por ke niaj nepoj iam havu benitan rikolton.*

Alivorte, kiel li skribis aliloke:

*Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboros la monton granitan ... cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas ... ni semas kaj semas konstante.*

La temo de la ĉefurbo kiel miraklejo vere ĉirkaŭas nin hodiaŭ.

En Ĝenevo en 1906, Zamenhof diris:

*Kiel la antikvaj hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jeruzalemo, por vigligadi en si la amon al la ideo monoteisma, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma. Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj ĉefa celo de niaj kongresoj.*

Ni nun faras la saman multflankan kuraĝigadon en la ĉefurbo de Usono, kaj, argumenteble, la ĉefurbo de demokratio – kiel ankaŭ, kiel Zamenhof diris, ĉi-semajne, ĉefurbo de Esperantujo.

Kaj parolante pri Jeruzalemo, mi trovas signifoplena ne nur ke ni festas Esperanton en Vaŝingtono, sed ankaŭ en ĝia antaŭurbo kie ni precize kongresas, Bethesda. Ĉar tiu ĉi plaĉa urbeto estas nomita por la antikva sanigejo Bethesda en Jeruzalemo kie la Princo de Paco kuracis la paraliziton. Jen, ĉe Bethesda, miraklo de la plej sperta miraklisto en la mondo!

Ĉi tiu mondo nun suferas multajn paralizojn. Estas multaj kuraciloj por tio, kaj ni havas unu el la plej efikaj. Nun, eble Vaŝingtono – kaj ĉi tiu Bethesda – povos naski alian miraklon – ke, kiel Lincoln diris ĉe Gettysburg, ni ĉi tie dediĉos nin al la granda tasko restanta antaŭ ni.

Tiu tasko nia estas fari nian parton de Tikkun Olam, la hebrea tradicio de la riparado de la mondo: utiligi kaj disvastigi nian sanigilon Esperanto por helpi kuraci la paralizojn de la mondo – la paralizojn de diskriminacio, miskomprenado, antaŭjuĝoj, maltoleremo, milito kaj malamo inter homoj, gentoj, rasoj kaj landoj.

Kiel Zamenhof diris ĉi tie antaŭ cent jaroj:

*Al tiu nia laborado, kiu celas krei iom post iom unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filo de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĝi baldaŭ eĉ resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.*

Feliĉan datrevenon, samideanoj, kaj feliĉan estontecon por nia kara Esperanto! ★

## Bonega itala renkontiĝo

Mi kaj mia fianĉino Anna bonŝancis ĉeesti la Internacian Junularan Festivalon (IJF) en Roncegno (Ronĉenjo), urbeto en la nordorienta montaro de Italujo, dum la unua semajno de aprilo 2010. (Ĝi tradicie okazas en iu itala urbo ĉiujare je la paska semajnfino.) Temas pri negranda aranĝo kun eble 80 homoj el diversaj landoj, inkluzive de Italujo, Germanujo, Francujo, Svisujo, Litovujo, Svedujo, Nederlando, Polujo, ktp, kaj mi eĉ ne estis la sola usonano, kvankam la alia, Lauren, same kiel mi, loĝas en Eŭropo.

La evento okazis en plaĉa komforta hotelo "Semiramis" en la montara urbeto Roncegno. Ĉiuj dormis en la hotelo, kaj ĉiuj prelegoj, koncertoj, ktp okazis en tiu hotelo, kaj estis manĝoservo en la hotelo, do tre konvene. Krome, por manĝo-memzorgantoj, estis tuj apuda manĝobutiko, parko kun piknikejo, kaj sufiĉe proksima picejo "Il Picchio" kun tre bongustaj picoj kaj eĉ tute esperantigita menuo kaj specialaj prezoj por ni esperantistoj dum la semajno. Do la organizintoj bonege elektis kaj preparis la festivalejon.

Kompreneble okazis prelegoj kaj diskutoj dum la semajno pri diversaj temoj, ekzemple: urba serĉludo por alkitimigi nin al la ĉirkaŭaĵo; la itala iniciato RoMEo traduki komiksojn en Esperanton (ili jam eldonis la bonegajn librojn Rat-Man kaj Diabolik) kaj ilia altkvalita traduka sistemo; matematiko kaj ludoj; ĵaluzo en amrilatoj; kulturaj diferencoj inter Eŭropo kaj Azio; memkritika diskutrondo por plibonigi nian Esperanton; enkonduko en la italan lingvon; vespera kriminala ludo, en kiu 4 taĉmentoj de

## Russ WILLIAMS

Antaŭe de Aŭstino, Teksaso, Russ nun loĝas en Vroclavo, Polujo kun sia fianĉino Anna SKUDLARSKA.

**xiomortas@gmail.com**



detektivoj esploris murdon, pride mandante la 5 suspektatojn kaj prisercante lokojn ĉe la krimsceno por eltrovi la murdinton (mi fieras, ke nur mia grupo sukcesis solvi la kazon!); ludado de diversaj strategiaj ludoj (goo, ĉina ŝako, ...); paska diservo; kaj multaj aliaj diversaj tiaj eventoj.

Ne mankis ankaŭ nokta distra programo, kun vere riĉa altkvalita koncertaro. Tomio (de la sveda bando Perdita Generacio – unu el miaj plej ŝatataj bandoj) intime koncertis per gitaro malfrunokte en la gufujo. Asorti prezentis tradician litovan muzikon, kaj ne nur: ankaŭ estis tre plaĉa por mi kiel usonano nekutima kaj verva versio de la klasika usona rok-kanto "Sweet Home Alabama", kiun ili amuze esperantigis al "Dolĉa hejmo Esperanto". Platano de PafKlik repis kaj dancigis homojn. Tre populara dana akordionisto Kim HENRIKSEN de iama Esperanto Desperado ankaŭ dancigis homojn, kaj okazis kortuŝa kaj impona reunuiĝo de Kimo kun sveda gitaristo Micke ENGLUND, do 2 el la 3 fondintoj (kun Bertilo WENNERGREN) de la frua influa Eo-rokbando Amplifiki – Kimo kaj Micke ne koncertis kune ekde multaj jaroj, sed ambaŭ ĉeestis ĉi tiun IJF, do ludis plurajn kantojn kune, inkluzive la faman popularan kanton "Sola". Certe la plejmulto de esperantistoj neniam

(daŭrigo sur p. 20)

## In the Mood

A few weeks ago I heard a flight attendant announce that airline policy “requires that all window shades are open during takeoff.”

Back in my youth, which still seems not all that long ago, I would have expected to hear that the policy requires that shades *be* open during takeoff. Alas, reports of the death of the subjunctive mood in English are not so exaggerated.

Don’t worry, I’m not devoting this column to nitpicking English grammar. But that experience got me thinking about the general subject of what are called verbal “moods” (or sometimes “modes”), and the fact that many Esperanto speakers, notably those who come from an English language background, have trouble with them. Today’s schools often ignore the subject (and it doesn’t help that the term “subjunctive” in English is applied to two different moods, thus making it harder than it needs to be).

So just what is a mood in the context of verbs? The easiest way to explain is by example.

The most common mood, in Esperanto and in English, is the *indicative*, so called because we use it to “indicate” something: *Leono estas besto. La unua Universala Kongreso okazis en 1905. Venontjare Esperanto-USA kongresos en Berklio.* The tense endings *-is*, *-as*, and *-os* are the endings of the indicative mood. This is probably the easiest mood to understand because it’s so basic. Students do make mistakes with it, for example using the wrong tense (often caused by interference from their native language), but past the beginner level they rarely mis-



### D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgary@mindspring.com](mailto:dgary@mindspring.com)

use the indicative mood except by using it when they should be using something else.

Another mood familiar even to beginners is the *infinitive*, marked by the ending *-i*. The infinitive is used almost like a noun, so we can say, for example, *Mi volas manĝi* as we would say, *Mi volas manĝaĵon*. There are two rules that help students avoid mistakes:

1. When two verbs come together, the second one should be an infinitive. (We wouldn’t say *Mi volas manĝas*.)
2. An infinitive can never serve as the main verb of a clause.

The two remaining moods are the ones that give more trouble: the *conditional* and the *imperative*.

The ending *-us* marks verbs in the conditional mood, which despite the name is actually used to convey that something is unlikely. Consider the following two sentences. Which of them is grammatically correct?

- *Se vi estos tie, ankaŭ mi estos tie.*
- *Se vi estus tie, ankaŭ mi estus tie.*

The answer is, “It depends on what you’re trying to say.” Both are “conditional” in some sense, but the first would be used to speak of something deemed likely and the second to convey doubt. This might be clearer if we expand the first example into a bit of dialog:



Li: *Ĉu vi estos ĉe la festeto? Mi estos tie.*

Ŝi: *Se vi estos tie, ankaŭ mi estos.*

Here's the equivalent in English:

He: *Are you going to be at the party? I'll be there.*

She: *If you're going to be there, I will too.*

Now consider this somewhat different conversation in both languages:

He: *I won't be at the party. I wouldn't enjoy it.*

She: *If you were to change your plans, I would go.*

Li: *Mi ne estos ĉe la festeto. Mi ne ĝuus ĝin.*

Ŝi: *Se vi ŝanĝus vian planon, mi irus.*

In the latter bit of dialog, except for the very first assertion (*Mi ne estos ĉe la festeto*) the speakers are referring to something that's either doubtful by itself or else conditional on something unexpected or doubtful.

The distinction is a bit subtle but useful for conveying information.

The conditional is also employed in both English and Esperanto as a way to express a polite request. *Mi volus kafon* ("I'd like coffee") is less insistent than *Mi volas kafon* ("I want coffee.")

Another convention is to use the verb *devi* in the conditional mood (*devus*) to express an obligation or something we ought to do, as in *Mi devus ĉeesti la kunsidon* ("I should attend the meeting.")

Since the conditional mood has in itself no way to express tense, saying something like "I should have attended the meeting" requires more than one word (as it does in English, for that matter), as for example, *Mi estus devinta ĉeesti*

*la kunvenon*. A variant that is sometimes used, and is a logical extension of the usual grammar of Esperanto, is *Mi devintus ĉeesti la kunvenon*. After all, the participle *devinta* is technically an adjective, and Esperanto allows us to form so-called stative verbs from adjectives: *Vi belas*, for example, in place of *Vi estas bela*.

Whether to teach your students about such not-quite-standard constructions is up to you, but there's a lot to be said for the conventional advice of teaching them to recognize what *devintus* means in case they run across it, but at the same time discouraging them from using it themselves until they have become more familiar with the language.

Now we come to the *-u* ending, which Esperanto uses for the imperative. Native English speakers have no problem employing *-u* in the second person in a simple sentence, as in *Iru for!* or *Silentu!* because that's how the imperative is used in English. A little harder to get our minds around is a first- or third-person imperative such as *Ni komencu la kunsidon* or *Ĉiuj kantu*. The closest English equivalent is a construction with the verb "let": "Let's start the meeting" or "Let everyone sing."

It's helpful here to point out to students that the imperative is really an expression, a wish, or an opinion that something should be done. *Iru for!* conveys the message "I want you to go away" or "You should go away." Likewise, *Ni komencu* and *Ĉiuj kantu* can mean "We should start the meeting," or "I want everyone to sing." In fact, the Esperanto ending *-u* is often called the "volitive," related to the verb *voli*.

(continued on p. 19)

## Bona poezia studo

Ĉi tiu libreto de 28 paĝoj prezentas dulingve (angle kaj esperante) la mond-faman poemon de Edgar Allan POE. Ilustrite simple, la bildoj kreas spacojn inter la versaroj, por indiki al la leganto, ke prefere oni legu malrapide, mediteme, eĉ deklame. Neniel la verko mem bezonas plian ornamaĵon.

La titola vorto de la poemo estas *Raven*, tradukite samsilabe kiel *Korvo*. La uzo de la genronomo, kaj ne la specinomo, *Korako*, konvenas al la ritmo. La plej konata vorto de la verko estas la angla *Nevermore*, fortsona vortkuniĝo ne facile tradukita. Ĉu traduki ĝin *Ĉiam for*, *Ne plu for*, aŭ *Neniam plu*? La respondo dependas ne simple de la baza signifo, sed ankaŭ de la bezono rimi diversmaniere en ĉiu versaro. Kiom da vortoj troveblas por konveni al *plu*?


Ĉiu traduko perfidas la originalon, ĉu laŭ la senso, la rimo/ritmo, la sono, aŭ laŭ la spirito. Ĉi tiu eldono tre honeste komenciĝas kun klarigo de du aliaj tradukoj de la sama poemo, tiuj de Kalman KALOCSAY kaj Leopoldo H. KNOEDT. Do, ĉiu leganto povas kontroli kaj kompari la tri tradukojn, kaj dume havas tre konvenan kaj agrable ilustritan libreton por unu traduko. Oni povas trovi la aliajn rete en la kolekto de Don HARLOW:

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo>

La traduko de Willarson en ĉi-libreto estas serioza, sed ne perfekta. Tio signifas, ke ĝi bone kreas la rimon, ritmon, kaj etoson de la poemo. Difekteto estas tio, ke la foja malapero de komo aŭ litera ĉapelo konfuzas la gramatikan sencon. Pli grave, la tradukanto postlasis multon

diritan de Poe, tiel ke oni ne tute spertas la poemon sen scio de la angla originalo. Senkulpigo por tio estas la fakto, ke la angla ĝenerale bezonas malpli da silaboj ol Esperanto, do oni ne havas sufiĉan spacon en la Esperanta verso por diri ĉion.

Tamen, ĉiu el la tri tradukoj sukcesas aŭ mankas diversmaniere. Ĉiu verkanto havis preferitan celon, aŭ parton de la tuta tradukado. Ĉiu fidelas al la ritmo kaj rimoj. La traduko de Kalocsay lerte konservas ĉiun detalon de la originalo. Li celis al akurata traduko de ĉiu imagbildo, eĉ la mencioj el la mitologio, gravaj al Poe, kiu havis la plej klasikan edukon haveblan en la 19-a jarcento. Tamen, al ni modernuloj, tiuj citaĵoj ŝajnas fremdaj kaj nepenetreblaj, ĉar nia edukado ne enhavas studadon de la greka kaj latina literaturoj.



**La Korvo.** 27p. 2009. Originale eldonita en *American Esperanto Magazine* en 1955. Reeldonita fare de la Esperanto-Societo de Chicago por soleni la 200-jaran datrevenon de la naskiĝo de la aŭtoro. (Vidu ankaŭ la dorsan kovrilon.)

Tiu de Knoedt estas tre taŭga traduko por modernulo, ĉar li simpligas la klasikajn citaĵojn por esti pli kompreneblaj. Dume li bone esprimas por ni la imagojn, ritmon, sonon, kaj spiriton de Poe.

La traduko de Willarson celas konservi la ritmon, sonon kaj spiriton de la originalo, sed forigis multon de la verko de Poe, cele al simpleco. Tiu versio estas tre komprenebla kaj legebla por angleparolanto, kiu scipovas legi la apudan originalon. Tiel la traduko rolas bone kiel studo de la Esperanta poezio, kaj enkonduko al la aliaj tradukoj. Fakte, unua Willarson skoltis la malfacilan terenon,

kaj nur post du jardekoj aperis aliaj tradukoj de ĉi tiu tre unika kaj malfacile tradukita verko. Liaj versoj estas fluaj kaj belaj, kaj aperas interesaj vortuzoj, kiel *malbruo, kvietajoj festis, elanime*.

Konsiderante ĉion oni ne elektu unu-solan perfektan tradukon de *La Korvo*. La serioza studanto de la poezioj angla kaj Esperanta devas legi la tri. Tamen por ĝojo de legado, por distriĝo, por simple ĝui la Esperanton, mi rekomendas la novan eldonaĵon, kiu prezentas la verkon de Willarson al nova generacio de esperantistoj.

– George BAKER

### **In the mood** (continued from p. 17)

It's in subordinate clauses where we're most apt to use the indicative when we should be using the imperative. A student who wants to say "I insist that he come tomorrow" may well say, *Mi insistas, ke li venos morgaŭ* (or even worse, "... *ke li venas morgaŭ*"). But the indicative mood "indicates" something, so *Mi insistas, ke li venos morgaŭ* would mean something like "I insist that it's a fact that he will come tomorrow." If the speaker is trying to express a demand rather than an emphatic prediction, what he or she ought to say is *Mi insistas, ke li venu morgaŭ*.

You might also point out in passing that in English, the corresponding expression is "I insist that he come tomorrow." Some students might suppose that "he comes" is correct, because that's how they learned the indicative mood in school, and school didn't bother to teach them very much about other moods. The rule is that where Esperanto uses *-u*, English generally uses the form of the

bare infinitive, as in "... that the window shades be open ...". A bit confusingly, gurus of English grammar call this mood the "jussive" or the "jussive form of the subjunctive." It's probably safe to say that most English speakers have never heard of the jussive and it's just as well.

Which brings up another point. Do we want to hit students with technical terms like "mood" and "indicative"? I'd say it depends on the students and their backgrounds. There's nothing wrong with simply talking about how to use the verb endings without naming the corresponding moods. On the other hand, if students happen to know enough grammatical terminology already, there's no harm in using it and it might serve to help make things clear.

A final note: It's useful to remind students that we're not talking about arbitrary rules like those that govern a card game but rather tools for conveying meaning. We use tenses and moods to better get across exactly what we're trying to say. ★

## **Bonega itala renkontiĝo** (de p. 15)

havis oportunon aŭdi iamajn membrojn de Amplifiki kunkoncerti tiel, kaj tio estis tre impona sperto por mi, kiu penis min nostalgie pri la diversaj vivojoj de homoj. Poste okazis du koncertoj de du ege talentaj gitaristoj: argentiano Hernano Diego LOZA kaj franco François STRIDE ambaŭ ravis per belega preciza gitarludado laŭ malnovaj klasikaj stiloj. Krome Hernano ludis akompanata de sia edzino Daniela VERONESI, profesia operstila kantistino, kiu belege kantas. Krome la germana muzikisto Johannes MUELLER fojfoje klavare aŭ gitare akompanis kelkajn kantojn dum la oficialaj koncertoj. Resume estis multmaniere plaĉega semajno muzike!

Okazis kelkaj ekskursoj for de la festivelejo por vidi pli da Italujo, inkluzive tuttagan ekskurson al apudaj urboj (Viĉenco kaj Bassano del Grappa) kun bela malnova arĥitekturo, tradicia foiro en urboplaco, interesa muzeo pri itala milita historio, ktp. Multaj el ni ankaŭ ĝuis matenan naturan promenon en la montara arbaro tuj ekster Roncegno (bonsance la fojfoje pluva vetero iĝis tre plaĉa dum tiu promeno!)

Kelkaj sufiĉe gravaj movadanoj ĉeestis IJF, ekzemple longtempa eldonisto kaj aktivulo Bruĉjo KASINI, kaj ankaŭ Giorgio SILFER, kiu disdonis ekzemplerojn de la periodaĵoj Literatura Foiro, Heroldo de Esperanto, kaj Femina; vendis rabate novan zamenhofologian kolekton Homarane; kaj klere aldonis tre interesajn historiajn informojn dum la tuttaga ekskurso. Unu tagon venis intervjuistino de itala televido por filmi nin.

Estis bonega semajno por revidi kaj pli bone ekkoni malnovajn amikojn de antaŭaj aranĝoj, kaj ekkoni novajn amikojn, inkluzive kelkajn freŝbakitajn esperantistojn kiuj jam bone parolas la lingvon post nur kelkaj monatoj. (Kelkaj lernas en la evidente aktiva kaj efika berlina klubo, inkluzive eksterlandanojn de Usono kaj Finnlando.) Unu plaĉa koincido estis ke unu el niaj samĉambranoj Manuel hazarde estis nia ĉiĉerono en Venecio en 2006, dum aŭtobuso survoje al IJK en Sarajevo haltis dum malmulta tempo por iomete da venecia turismado. Estas tre agrable kaj amuze rerenkonti tiajn homojn denove! Nia alia samĉambrano Daniele hazarde estis amiko ekde longe (eĉ vizitinte nin hejme antaŭ kelkaj monatoj). Multe da amikeca interparolado okazis malfrunokte, ĉar ja temas pri “junulara” festivalo, do okazis sufiĉe da malfrunoktaj dancado, drinkado, karaokeado, kaj babilado. Okazis gustumado de alkoholaĵoj de diversaj landoj (mi aparte ĝuis italan citronan trinkaĵon “Limoncello”). Krome oni oftege trinkas vinon kaj kafon en Italujo, kaj pro la speciala oferto en la picejo, mi ĝuis kvaronan litron da vino plus kafo kun mia pico ĉiuvespere...

Do por ni estis bonega semajno kun multaj memorindaj spertoj. Koran dankon al la organizintoj Boris, Fabio, Elina, kaj aliaj. Estis nia unua IJF, kaj ni esperas ke ne la lasta! Mi tre rekomendas la eventon al ĉiu esperantisto, ĉu juna korepo aŭ nur kore!

Por pli da informo pri IJF, vidu:  
<http://iej.esperanto.it/ijf/2010/index.eo.php>



## Ĉu ekzistas “verda banko”? Kio ĝi estas?

En ĉi tiu rubriko ni aperigas respondojn al viaj demandoj pri lingvo, gramatiko, kulturo, literaturo, historio, kaj iu ajn rilate Esperanton. Se vi havas demandon, nepre sendu ĝin al ni!

*Lastatempe oni demandis pri la ekzisto de “verda banko” en Esperantujo. Dankon al Vilĉjo HARRIS, Direktoro de la Centra Oficejo (CO) de Esperanto-USA, pro la klarigo:*

Ĉiu membro de UEA, kaj ĉiu organizaĵo kiu aliĝis al UEA (eĉ libroservoj kaj regionaj grupoj) aŭtomate havas konton ĉe UEA.

Ĉiu aliĝinto ricevas unikan identigan kodon, ekzemple “abcd-e”. La kodo estas ankaŭ la nomo de la konto.

Per landa peranto, oni povas sendi monon al sia aŭ alia konto, aŭ tiri monon el sia konto. La peranto por Usono estas Esperanto-USA.

Servo-kosto por sendi monon estas 5% de la sumo, maksimume \$10. Tamen oni povas tiri monon el sia konto senkoste. Servo-kosto estas nulo kiam oni abonas revuon, aŭ pagas UK-kotizon, UEA-donacon, aŭ membrotizon de UEA. Interezo estas nek ŝuldata nek gajnita.

Ekzemplo: Via konto estas “abcd-e”. Vi volas partopreni kongreson en Danujo kaj vi bezonas pagi al Dana Esperanto-Asocio (DEA) €200,00 por kotizo kaj loĝado. La konto de DEA estas “bcde-f”.

Do vi petas kurzan informon de la CO de Esperanto-USA; la Direktoro respondas, ke €200,00 egalas al \$270.04, kaj la servo-pago estas \$10... do la tuta sumo pagenda estas \$280.04.

Vi sendas al la CO tiun sumon (en dolaroj), kun la jena informo: la konto-kodo



de DEA, via konto-kodo, kaj klarigo pri la pago. La Direktoro sendas ĝiropeton al UEA. Ambaŭ vi kaj DEA ricevas kopion de la ĝiropeto, ekzemple:

Bonvolu transpagi €200 el la konto de Esperanto-USA (elna-w) al la konto de Dana Esperanto-Asocio (bcde-f) nome de [via nomo] (abcd-e) por pagi kotizon kaj loĝkoston ĉe la dana kongreso.

DEA poste sendas al vi kvitancon rete.

Inverse, se iu en Danujo volas sendi monon al vi, vi ricevos mesaĝon pri tio, kaj la mono iros en vian konton. Vi mem devas peti al UEA transpagi sumon (en dolaroj aŭ eŭroj) el via konto al la konto de Esperanto-USA. (La CO helpas vin pri la ĝustaj frazoj, se necese.) Poste, vi petas ĉekon de la CO por la ĝusta sumo en dolaroj.

Ĝenerale, usonaj bankoj postulas grandan sumon por akcepti eksterlandajn ĉekojn, kaj eksterlandaj bankoj simile pagigas vin por akcepti usonajn ĉekojn. Pro tio, oni ofte uzas kreditkartojn por pagi trans landlimoj. Tamen, la plejparto da individuoj, kaj multaj Esperantaj organizaĵoj, ne povas akcepti pagojn per kreditkarto.

Tamen per ĉi tiu sistemo, esperantistoj povas transpagi monon ĉirkaŭ la mondo sen granda kroma kosto. ★

# krucvortenigmo

Revenas la krucvortenigmo, nun eĉ pli diable ruza! Ĉu vi kuraĝas provi ĝin? Unu solvinto ricevos \$10-rabaton de la libroservo de E-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) **antaŭ la 16-a de aŭgusto**.

Temo de la ĉi-numera enigmo estas *kalemburoj*: vortludaj mistranĉoj, per kiuj oni povas trovi plurajn (kaj foje, absurdajn) signifojn kaŝitajn en oftaj vortoj. Ekzemple, la vorton *martiro* oni povas legi *martir-o*, *mar-tiro*, aŭ eĉ *mart-iro*. Kalemburoj abundas en nia lingvo: ju pli multe oni serĉas, ŝajne, des pli multajn kalemburojn oni trovas!

## Horizontale

- 1 Nobel' inter markizo kaj princo
- 4 Malobserv' pri regulo, ofte morala aŭ religia
- 7 Sinsekvo ĝuste sub JKL, almenaŭ en Usono
- 10 Subterejo por elfosi valoraĵojn
- 11 "Murmuri \_\_\_ l' dentoj."
- 12 Fuŝ', aŭ... kolekt' da konsistigaj elementoj samspecaj?
- 14 Sendependa ŝtat', foje sub gvido de reĝo
- 15 Kembriĝa altlernejo
- 16 "Kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej \_\_\_."
- 17 Arigi varojn en taŭgan ejon
- 19 Ĉenoj, aŭ... monunuoj de japanaj felisoj?
- 21 Konduti

	1	2	3		4	5	6		7	8	9	
10					11				12			13
14					15				16			
17				18		19		20				
			21		22		23					
24	25	26				27				28	29	30
31					32				33			
34				35				36				
			37				38					
39	40	41				42		43		44	45	46
47					48		49		50			
51					52				53			
	54				55				56			

- 23 Kvinfingra il'
- 24 Persvadas per pruvoj
- 28 Jura decid'
- 31 "Du militas – \_\_\_ profitas."
- 32 Alta konstruaĵ'
- 33 Ĝi ĉirkaŭas fenestrojn, ofte
- 34 Fritil'
- 35 Maŝinkonstruaj artoj
- 37 "Iri for en bona \_\_\_."
- 38 Neniom
- 39 Surakva batalantar'
- 43 Rebonig', aŭ... ostgrup' de la torako?
- 47 Fetuj'
- 48 Malvira
- 50 "Ne falas frukto malproksime de l' \_\_\_."
- 51 Rabatvendado, en Rochester
- 52 Mil-kilograma mezurunu'
- 53 Disfalinta konstruaĵ'
- 54 Nom' de " , "

55 Scienca akademio en San-Marino (mll.)

56 Fikcia hundo Scooby kiu "rarolas"

## Vertikale

1 Nutromanier', aŭ... supernatura estaĵ' malgranda?

2 Gratilo

3 Kurba, aŭ... rilate al patro de patro de molusko?

4 Inter 12:00 kaj 24:00 (mll.)

5 Malalta arbust' ofte en nekulturitaj lokoj; antaŭnom' de la "ruĝa" Thorvalds-son en islanda eposo

6 Ŝip', aŭ... membro de grup' kiu adoras felisojn?

7 Al la grundo, aŭ... fazeolforma organ' por trinkaĵo farita el sekigitaj folioj?

8 Likvaj' el veziko, aŭ... fratin' de #29-vertikale?

9 Garda deĵoro

10 S-ino, en St. Louis

13 Plata, romboforma marfiŝ'

18 Agi iel, por ke io alia estu en stato ia

20 Tetrinkuj'

22 Malkonstanta, aŭ... kaj antaŭ fabela rakonto, kaj post fantazia misinformo?

24 lama bulteno de USEJ; mallongigo kies signifo similas la usonan

esprimon *yadda*, *yadda*, *yadda*

25 "\_\_\_ ŝlosilo ĉiun pardon malfermas."

26 Metala stanget' por kunigi metalpecojn

27 \_\_\_urbo: ne urbo, sed frukto

28 Sent' traktenda per #2-vertikale, ekzemple

29 Sovaĝa eŭropa bovo

30 Sent' de plezuro en la animo

33 Granda nombr', aŭ... pasi' por grenplanto?

35 Kutima kondukt' de iu popolo

36 "Por malfrua gasto restas \_\_\_ osto."

37 Kromvirinej', aŭ...inklin' al filamenta de mamulhaŭto?

39 Mambestet'; klavarkunul'

40 Ekbatat' kontraŭ malamiko

41 Trakero (la tria povas esti aparte danĝeral!)

42 Seninteresiĝi

44 Antaŭa parto de ŝipo

45 Pingloarbo, ofte vidata dum la kristnaska festo

46 Kiam duobligita, tiu silab' onomatopee imitas sonon de kato kontenta

49 Kurba elstaraj' surporda

## Senintenca esperantaĵo?



Unuavide, ŝajnas ke la posedanto de tiu aŭto emas fari ion ne aparte precizan... sed efektive temas pri medicina firmao *UltraMobile Imaging*. Fotita en Roĉestro, Novjorkio.

## Limeriko-rubriko

La solvo de la pasintnumera enigmo de Russ WILLIAMS estas *Julie & Julia*. Jen alia, denove pri lastatempa filmo furora:

**Mongajnis povrulo barata  
kaj estis do fitorturata.  
Fiaska ruino,  
pro am' al virino.  
Surprizis do helpo fifrata.**

La solvo aperos en la venonta numero!

# New in the E-USA bookstore

All items listed here can be ordered online at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> or by mail from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**. More complete descriptions can be found at our website. If a title is out of stock, you can have the online bookstore notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



## ILUSTRITA ENCIKLOPEDIO DE HEJMAJ MAMULOJ

**Nikolao GUDSKOV**


Priskribas ĉ. 50 speciojn de mamuloj el diversaj ordoj kaj familioj, kiuj pli-malpli ofte renkonteblas en hejmoj kiel dorlotbestoj, iliajn karakterizojn, konduton kaj kondiĉojn de hejma tenado. Mole bindita. 240 p. 2008. Rusujo. **\$33.50**



## HOMARANO

**Aleksander KORĴENKOV**

Nova biografio de la inciatinto de Esperanto, publikigita okaze de la 150-jariĝo de lia naskiĝo. Malmole bindita. 320 p. 2009. Litovujo. **\$56.20**



## ENGLISH-ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY

**John C. Wells**

A newly updated version of the original "Teach Yourself" dictionary by the same author. The English-Esperanto section contains over 22,000 English words and their meanings in Esperanto. Paper. 459 p. 2010. USA. **\$28.00** (Hardcover: **\$36**)



## LA BURĜO KONDAMNITA

**Arkadij kaj Boris STRUGACKIJ**  
**Tr. Z. KAĈALOVA, M. BISTROVA, D. VLASOVA, A. KIRJAKOV**

En la Urbo okazas Eksperimento, kiun partoprenas diversepokaj kaj diverslokaj homoj, ĉiu kun sia imago pri la celo de la projekto. Mole bindita. 351 p. 2009. Rusujo. **\$35.30**



## SERPENTOJ EN LA PUTO

**István NEMERE**

Terorismo, Al-Kaida, fanatikeco (ankaŭ ĉe la polica flanko), surprizoj...

Mole bindita, 183 p. 2009.

Rusujo. **\$28.90**



## RUBAJÁT DE OMAR KAJJÁM, LA EDWARD FITZGERALD

Enesperantigis David RICHARDSON. Jam estis tradukoj de la Rubaját en Esperanton de Lorenz, Bean, Waringhien, kaj Auld. Ĉi tiu verko estas traduko de la kvina eldono de la verko de Edward FITZGER-

ALD. Kun la famaj ilustraĵoj de Edmund DULAC. Mole bindita. 81 p. 2009. Usono. **\$35.60**



## PASPORTA SERVO 2010

**TEJO**

The latest edition of the annual catalog of hosts in the Esperanto network for global travel. Contains 1450 addresses in 91 countries. A necessity for the Esperanto-speaking tourist.

Paper. 210 p. 2010. Netherlands. **\$15.10**



## KORVO, LA WILLARSON

Translation of *The Raven* by Edgar Allan POE. English and Esperanto text on facing pages. Paper. 27 p. 2009. Russia. **\$4.40** (see review in this issue, p. 18!)